

AMERIKA ESPERANTISTO



June, 1923

	Page
Ho Fidelaj Esperantistoj	1
Notes and News from the Central Office	2
La Komerca Konferenco en Venezia	4
Esperanto and the Society of Friends	6
Sepa Brazila Kongreso de Esperanto	7
La Esperanto Movado en Norda Ameriko	10
Nekrologio	13
XV-a Universala Kongreso de Esperanto	14
Recenzoj	16
La Verda Folio	17
La Legendo pri la Postlasajo de la Maŭro "Lord, kick us out softly"	18
	20

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00: Contributing \$3.00: Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Vinton Smith, Secy., 586 Lake Park Ave., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo.—L. D. Stockton, Secretary, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.

Esperanto Association of California, Inc.—Meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secretary, 946 Central Ave.

MONTRÉAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association.—Meets each Monday evening at 8 in Room 12, The Tooke Bldg. Sec., Miss E. Strachan.

TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Club.—Meets every Thursday at 8.30 P.M., at the Friend's Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. Sec., A. P. H. Rollason, Box 123, Terminal A, Toronto.

WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanto Klubo.—Meets every Wednesday, at 8 P. M., during June and September, and between, at Apartment 53, No. 706 Eleventh St., N. W.

Kolumbia Esperanto Asocio.—No meetings during June and September, and between. Sin turnu al B. P. M., 1918 Sunderland Place.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park.—Jaroslav Sobehrad, Secretary, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esperanto Oficejo, 1669 Blue Island Ave.—Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiunonate.

ROCKFORD, ILLS.

Scandinavian Esperanto Institute, 1217 7th Ave.

BOSTON, MASS.

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. M. Marootian, Secretary.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

BALTIMORE, MD.

La Baltimore, Md., Esperanta Rondeto meets 1st and 3rd Wednesday evenings in month at Md. Academy of Sciences.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society.—Mrs. E. C. Flint, Secretary, 16 Sherman St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 607 Breitmeyer Bldg.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M.-9 P. M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.15 P. M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

Group Charter—\$1.00.

TOPEKA, KANSAS Esperanto Association. Prez. Capt. Geo. P. Morehouse. Sek-iino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St. Kores-Sek-iino, F-ino Leone Newell, 635 Watson St.

NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society.—Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Ave.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

WEEHAWKEN, N. J.

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo.—S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

OKLAHOMA CITY, OKLA.

La Oklahoma City Esperantista Societo kunvenas dimanĉe. R. E. Dooley, instruisto, 527 North Durland. Ni alte estimus korespondadon pri metodoj de propagando, klasorganizo, kaj studado. C.R.D.S. Oakford, prez., H. Barton, sek.

ERIE, PA.

La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, ing., St. John Kanty College eldonas $\frac{1}{2}$ -jaran jurnalon, "La Studento," jara abono \$1.00.

PHILADELPHIA, PA.

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Sec'y, West Phila. High School for Boys. Barco and monthly meetings on third Tuesdays at Hotel Hanover, 12th and Arch Sts. (Barco 6.45; business meeting 7.45 P. M.) Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Delegito de U. E. A.)

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanto Stelo de Polujo.—Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 501 N. York Ave.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art.—J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M.

Amerika Esperantisto

ORGANO
de la
ESPERANTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO
507 Pierce Bldg., Copley Square
Boston 17, Mass., U. S. A.

Vol. 31.

Junio, 1923.

No. 6.

Ho Fidelaj Esperantistoj Apudestas la montsuproj de sukceso

Malmultaj pašoj, malmultaj penoj kaj ni sukcesigos Esperanton. Ĉiuflanke heroldoj de bonaj novajoj estas anoncitaj.

Antaŭ longa tempo la stadio de eksperimento estas pasita. Per provoj plenaj kaj rigoraj en multaj landoj, en ĉiu sfero, Esperanto estas montriginta ilo perfekte taŭga por ĝia grava tasko.

Tasko tiel vasteetendanta, je ĝia plenumo tiel ŝargita je ne-imageblaj benoj por la mondo ke ni bone kun tremado devus ĝin pripensi.

Tasko kiu tamen estas la nia, inda niajn plej altajn talentojn kaj fortegajn laborojn.

Laŭte frapante la pordon de la Esperantistaro staras La Okazo. La Respondeco flustrante seriozecajn kuraĝigojn staras malantaŭe. Al la ega kaj la eta voĉo ni aŭskultos.

Ni Esperantistoj estos fidelaj al nia devo. Ni, dum tiuj sortoplaj tagoj lernos, uzos kaj disvastigos Esperanton kiel neniam antaŭe.

Tiamaniere kaj sole tiamaniere ni atingos la suprojn de Sukceso, kaj de tiuj penevenkitaj montpintoj surrigardos tagigon, la mondon briliantan per la promeso de Esperanto.

Harold Rollason.

Notes and News from the Central Office

Rev. & Mrs. Shibley Malouf (Ester-Terruso) announced the arrival of Master Waldense Debis Malouf on May 2nd. Mrs. Malouf is the Asst. Secretary of E. A. N. A.

Although a great many letters containing money arrive safely at the Central Office, there is always a risk, and within a few weeks there have been at least four cases, from as many directions, where we have failed to receive remittances. If it is not convenient to send a check, a post office order or postage stamps are much safer than bills and silver.

Several times during the past season an exhibit of Esperanto Magazines and samples of literature has increased the interest of groups. It is not difficult to get permission from Public Libraries to have an attractive exhibit of Magazines for a week or two in some conspicuous place. By planning a few weeks in advance the Central Office can supply from twenty to forty Magazines for such a purpose.

M. Edmond Privat writes that none of the Usono delegates who attended the meeting of the International Chamber of Commerce in Rome, were present at the meeting in Venice April 1-4 in the interest of a common commercial language. Three hundred went from the States and no doubt more from Canada; personal letters were written to delegates, and to samideanoj in at least twenty cities asking them to see any who might be going, or write them about the special session. As but few replies were received here, one wonders whether Esperantists or delegates are most culpable for lack of interest. WAKE UP SAMIDEANOJ and get on the map.

A group of workers in the Philadelphia office of the American Friends Service Committee are beginning a course in Esperanto. Their relief work in Russia has doubtless shown them the utility as well as the need of an auxiliary language.

Mr. Sussmuth spent a day in Boston recently and either saw or telephoned every samideanoj who could be reached. According to all accounts la verda stelo will be in evidence all over Hudson County during the Congress week.

Come to the Congress; write early for your reservations, and so help the Committee make proper plans.

If you cannot come to the Congress, send greetings, and help the sessions by making suggestions for promoting the growth of nia kara lingvo.

Notify C. O. if you are to attend Nuremburg Congress Aug. 2-8, date, port, steamer, etc.; also if you know of others who are going.

Miss L. F. Stoeppler, sails July 1, SS Bremen, No. German Lloyd, New York.

Frank Stephens, sails July 17, SS Hanover, No. German Lloyd, New York.

*

*

*

Write often and you keep the family together

We saw this happy slogan displayed in large letters in the General Post Office and we think it is very applicable to Esperantists. "Writing," says Lord Bacon, "maketh an exact man." May we not recover the lost art of letter writing and familiarize ourselves with and perfect ourselves in the language by writing in Esperanto.

Write to your friends at home in Esperanto. Esperantists often seem loth to use the language, but Esperanto is the language of friendship. A letter written in Esperanto invigorates personal friendship with the breezes of an expansive human sympathy.

Write to your friends over the seas in Esperanto. Esperanto is the language of goodwill. It gives kindred spirits a kindred speech. It encourages the sentiment of community between people of alien cultures, promoting between them not only "a feast of reason" but also "a flow of soul."

Write to the Editor of "Amerika Esperantisto." In Esperanto if you can. If not write in English as he has a fair knowledge of that language. In the Club Directory on the inside front cover of this magazine there are the names of twenty two Esperanto Groups. The Editor wants news from everyone of them. Let us through our Magazine say "Hello and How d'you do?" to each other once a month. This is the way to keep the Esperanto family together.

Address: A. P. H. Rollason, Editor,
Amerika Esperantisto, Box 123,
Terminal A, Toronto, Canada.

La Komerca Konferenco en Venezia

from "Esperanto" April 1923

Tiun ĉi fojon ni estis vere surprizitaj, kaj ne nur ni, sed ankaŭ la kuraĝa subskribinto de l' invitoj: la Itala Komerca Ĉambro por Svislando, kiu ne atendis tian sukceson kaj antaŭvidis, kiel ni, nur modestan kunvenon preparan al iamposta pli vasta konferenco. Ni do rajtas esti kontentaj.

El 23 landoj aliĝis 208 organizoj interalie tre gravaj: 84 Komercaj Ĉambroj en Eŭropo, 2 Ameriko, Afriko, Azio kaj eĉ Oceanio, la 21 grandaj foiroj de Eŭropo, 30 turismaj asocioj, 7 ministrejoj de komerco aŭ financoj kaj sesdeko da industriaj federacioj, bankaj unuiĝoj, eksportaj asocioj, komercaj lernejoj ktp.

Ilin reprezentis en Venezia 150 oficialaj delegitoj kaj venis entute pli ol 250 personoj por partopreni la konferencon. Parolis kaj voĉdonis nur la rajtigitaj delegitoj. Inter la aliĝoj **ne** akceptiĝis esperantistaj societoj. Tiamaniere la konferenco konservis ĉiam pure teknikan karakteron. La plej multnombraj delegitaroj estis la itala (75), la franca (52), la svisa (42), la brita (16), la ĉehoslovaka (14), la germana (8), la dana (6), la rumana (5) kaj la hungara (5).

Ni devas tiun ĉi jaron aparte gratuli niajn francajn amikojn pro tiu ĝojiga sukceso. Ili multe laboris por ĝin efektivigi kaj ili ludis en la konferenco unuarangan rolon. Pro plendo de gravaj francaj industriuloj kaj scienculoj, la ministro de publika instruado komprenis sian lastjaran eraron kaj ĝin ekripidis. Kun lia konsento kaj tiu de la komerca ministro, la Komerca Ĉambro de Parizo lastmomente decidis sendi al Venezia sian eminentan membron S-ron Andre Baudet, kiu sekvis tuj kvin aŭ ses lecionojn de esperanta interparolado kaj mirigis la konferencon per sia bonega elparolo.

Similan rezultaton atingis ankaŭ la grava delegito de la Komerca Ĉambro de Milano, Prof. Ravizza, direktoro de ĝia Komerca Lernejaro, kiu eklernis la gramatikon en la vagonaro kaj tre klare parolis Esperanton dum la konferenco, malrapide, sed tute korekte. Alveninte skeptika, li foriris konvinkita, kaj serioze fervora. Same kiel Prof. Bovet post la Geneva Konferenco, li estos la grava gajnito post la Venezia. Ni atendas kun granda intereso lian ateston ĉe la Milana Komerca Ĉambro.

El Britlando la Londona Komerca Ĉambro sin oficiale reprezentigis kaj ni devas danki al S-ro Edmonds, ne nur pro lia senlaca korespondlaboro dum la tuta jaro, sed ankaŭ pro lia rimarkinda enketo inter angla komercistaro. Lia interesa raporto meritus presigon **in-extenso** kun ĉiuj entenataj valoroj atestoj de industriuloj kaj importistoj, kiuj konigas sian sperton kaj ŝaton pri uzo de Esperanto. El la Komerca Ĉambro de

Sheffield venis al la konferenco ĉi ties prezidanto S-ro John Merchant, kies konstanta bonhumoro kaj pacienco ĉion gaje glatigis.

El Germanio sin reprezentigis du ministrejoj kaj ludis ĉefan rolon la grandaj foiroj de Frankfurt kaj Leipzig. Sub prezido de D-ro Dietterle la ĉiulandaj Foiroj plifirmigis sian interrilatan organizajon kaj sincere povis atesti ĉe la konferenco sian vere profitplenan uzon de nia lingvo.

El Cinaj Komercaj Ĉambroj venis kuraĝigaj aligoj kaj el Rumanio revenis al ni malnova samideano, nun granda komercisto kaj industriulo en Bukaresti S-ro Henrico Fisher, kiu ludis en la konferenco tre ageman kaj utilan rolon ankaŭ fondinte la internacian varborson.

Duoble pli vasta ol la Ĝeneva, la Venezia Konferenco estis ankaŭ pli grava en tiu senco, ke multe grandigis la proporcio de oficialaj delegitoj eklernintaj la lingvon nur por partopreni. Tamen, sen ia decido, Esperanto fariĝis tuj la sole uzata lingvo en la laborkunsidoj, ĉar ĉiuj sentis la oportunecon de ĝi rimedo.

Komence oni aŭdis pri la spertoj faritaj, unuarange de la foiroj. Poste oni diskutis pri la rezolucio de la Komerca Ĉambro de Parizo.

Plena libereco regis kaj, unu post la aliaj, anonciĝis la aligoj de la diverslandaj Komercaj Ĉambroj. Por la ĉefaj landoj, raportintoj ankoraŭ mencias la malfavorajn voĉdonojn aŭ sindetenojn de pluraj Ĉambroj. Rimarkinda estas la granda proporcio de favoraj decidoj, ekz. en Francio 30 jes kontraŭ 5 ne. Ĉe la konferenco mem la rezolucio Pariza estis unuanime akceptata post tiu longa diskuto kaj Esperanto rekomenadata al la tutmonda komercistaro kiel spertita kaj elprovita helplingvo.

Poste venis diversaj eksteraj rekomenadoj al UEA, tre riĉa kunsido pri spertoj en turismo, interesa diskuto pri telegrafio kaj senfadena telefonio kaj trafa fermkunsido kun klaraj resumoj kaj fina voĉdono de rezolucioj. La tuta konferenco laboris serioze kaj vigle. Praktika metodo de komercistoj ĉie regis, ĝia raporto, nun preta en franca, angla, germana, itala kaj esperanta lingvoj, estas unu el la plej legindaj dokumentoj pro la riĉeco de faktoj, atestoj kaj aligoj.

Sur ĝi povos enskribiĝi la malfrue alveninta aligo de L. M. la Ministro Itala de Komerco kaj Industrio, kiu jus akceptis doni al la konferenco sian altan patronadon. Dankinte al li, al la Itala Komerca Ĉambro en Svislando, al la Urbo kaj Komerca Ĉambro de Venezia kaj al niaj italaj samideanoj pro la ĉiuspecaj helpoj kaj gastigoj, ni nun resumos la situacion:

Nova armilo kreiĝis por divastigi la helplingvon en novan rondon, eble la plej gravan. Ĝia pretigado signifis ŝvitigan laboregon de la tuta jaro, sed la vidajo de ĝi florkresko ĝojigas hodiaŭ niajn okulojn. Nun komencas la tasko de ĝi tutmonda esperantistaro ĝin uzi senprokraste, saĝe kaj efike. Komercaj

kaj turistaj gazetoj devas ricevi artikolojn kun la rezolucioj. Komercaj lernejoj devas koni la raporton kaj super ĉio en ĉiu urbo vi devas trovi urĝe almenaŭ dek aligojn de komercaj entreprenoj al UEA por komenci la deziritan "Komercan jarlibron." Fide kaj danke ni atendas tiun respondon de nia amikaro.

Edmond Privat.

* * *

Esperanto and the Society of Friends

Esperanto and Quakerism have so much in common that it has been a matter of surprise that Esperanto has not been more generally taken up by Friends.

Now, however there are distinct signs of "concern" among Friends in relation to Esperanto.

It is interesting to note that a group of workers in the Philadelphia Office of the American Friends Service Committee are beginning a course in Esperanto. This seems to show that their experience in relief work in Russia and other European countries has convinced them of the utility, necessity and practicability of Esperanto.

The International Fellowship of Reconciliation whose International Secretariat is at 17 Red Lion Square, London, W. C. 1. is about to hold an International Conference at Nyborg, Strand, Fyn, Denmark, from July 19th to the 26th, for the consideration of what may be done by such an organization for the peace of the world.

The application form includes the question, "Do you hope by the time of the Conference to understand Esperanto? and the invitation to join concludes thus:—"It has been decided on mature consideration to make a serious effort to use Esperanto as the sole language of translation in the discussions."

It is very important that we should disabuse our minds of the idea that Esperanto is in the experimental stage. The International Conference of Trade and Transport Organizations held recently at Venice used Esperanto exclusively. Now another International Organization is following suit. Is it too much to predict that in the course of a few years Esperanto will become as indispensable as those artificial aids to human intercourse, the automobile, the telephone and the decimal system?

There is, however, this distinction that Esperanto carries with it an atmosphere of goodwill even as the solid world bears along with it the air by which we live. We have felt for a long time that there is in the "interna ideo" of Esperanto a close kinship with the "inward light" of Quakerism.

Friends will be interested to know that Mr. Montague Butler, the esteemed Secretary of the British Esperanto Association, who we believe, is himself a Quaker, has translated "Quaker Strongholds" by Caroline Stephens into Esperanto. Other Quaker literature has also been disseminated in Esperanto.

In England there is a Friend's Esperanto Society whose membership includes many of the leading Friends and we notice that in some of the larger centres such as Bradford, Blackburn and Keighley the local Esperanto Group meets in the Friends Meeting House.

We should be glad to hear of activities of Friends in the Esperanto Movement here in America. The Toronto Society meets by the kindness of the local Friends, in a room in the Friend's Church and the members of the Society have shown themselves sympathetic and interested in the Esperanto Movement.

Will readers of Amerika Esperantisto please bring this article to the attention of any members of the Society of Friends with whom they may be acquainted.

Information about Esperanto will be gladly sent on application to the Secretary, Esperanto Association of North America, 507 Pierce Bldg., Copley Square, Boston 17, Mass., U. S. A.

The writer would be glad to hear from Friends or others regarding the spread of Esperanto among Members of the Society of Friends in the United States and Canada. Please address The Editor, Amerika Esperantisto, Box 123, Terminal A, Toronto, Canada.

Sepa Brazila Kongreso de Esperanto

by Alberto Couto Fernandes

Prezidanto de Brazila Ligo Esperantista

Eksterordinare brila kaj fruktodona estis la Sepa Brazila Kongreso de Esperanto okazinta en Rio de Janeiro, de la 19a ĝis la 24a de Aprilo, kiel memorigo de la Centjarfesto de l' Sendependeco de Brazilio. Gia Organiza Komitato konsistis el la fervoraj geesperantistoj D-ro Heitor Beltrao, Ing. Pinta Pessoa, D-ro Carlos Domingues, S-ro Alcindo Terra, S-ro Antonio Vaz kaj F-ino Esther Bloomfield.

Akceptis la titolon de honora prezidanto de l' Kongreso D-ro Joao Luiz Alves, Ministro de l' Enlandaj Aferoj, kaj D-ro Felix Pacheco, Ministro de l' Eksterlandaj Aferoj.

Stato Maranhao, kies prezidanto, D-ro Godofredo Vianna, ja estas konata kiel amiko de Esperanto, monhelpis la kongreson kaj sendis specialan delegiton.

Aliĝis al la kongreso, kiel patronoj, kaj sendis oficialan reprezentanton la jenaj ŝtatoj: Amazonas, Para, Piauhy, Rio Grande

do Norte, Parahyba, Pernambuco, Alagoas, Sergipe, Bahia, Es-
perito Santo, Rio de Janeiro, Minas Geraes, Parana, S. Catharina,
Goyas, Matto Grosso kaj Teritorio Acre.

19a—Je la 16a horo okazis la prepara kunsido sub la prezido
de D-ro Heitor Beltrao, dum kiu oni elektis la jenan estraron
de la Kongreso: Prezidanto—D-ro Leonel Gonzaga da Fonse-
ca, vic-prezidanto—subkolonelo Jose Silviera Sobrinho, ĝenera-
la sekretario—D-ro Joao Baptista de Mello e Souza, unua sek-
retario—F-ino Maria Luiza Bocayuva, dua sekretario—S-ro An-
tonio Vaz. Je la 20a ĉe la Palaco de l' Festo de la Internacia
Ekspozicio okazis la solena malferma kunsido sub la prezido de
D-ro Joao Luiz Alves, ministro de l' Enlandaj Aferoj. Ĝin ĉe-
estis la reprezentantoj de D-ro Arthur Bunandes, Prezidanto
de l' Respubliko, de l' Ministroj de l' Eksterlandaj Aferoj, de
Milito, de l' Publikaj Laboroj, kaj de Terkulturo, de l' Ŝtatoj
aligintoj, de l' Ĉefepiskopo kaj de multaj gravaj asocioj.

Oni povas kalkuli en ĉirkaŭ mil personoj la ĉeestantaroj de
tiu brilega kunsido, kiu superis ĉiujn antaŭajn okazintajn en
Brazilio.

Faris bonegan paroladon la fama ĵurnalisto Medeiros e Al-
buquerque, membro de la Brazila Literatura Akademio.

Poste parolis reprezentantoj de diversaj asocioj kaj de Ŝtatoj
Maranhao, Pernambuco, Rio Grande do Norte, kaj Bahia. D-ro
Joao Luiz Alves, fermante la kunsidon, diris ke li estas tre rav-
ita pro tio ke li havis la plezuron prezidi la Kongreson. Ke liia
ĉeesto, kiel ministro de la Publika Instruado, signifas ke la Bra-
zila Registaro, kiu ĉiam rigardis simpatie la propagandon de
Esperanto, daŭrigas doni sian moralan kaj materialan subtenon
al tiu tre utila lingvo.

Poste okazis koncerto, kiu estis multe aplaŭdata. La parolad-
oj, la kantoj kaj la muziko estis aŭdataj en la Ekspozicio pere
de la Senfadena Telefono.

20a—Je la 16a horo efektiviĝis la "Literatura Horo," kies pro-
gramo estis la jena: "Esperanto kaj la Universala Paco"—Gen-
eralo D-ro J. M. Moreira Guimaraes. "Printempo kaj laŭdado"
—F-ino Maria Luiza Bocayuva. "La neŭtrala lingvo en la kom-
ercaj rilatoj"—D-ro Heitor Beltrao. "Esperanto kaj la poetaro"
—D-ro Joao Baptista de Mello e Souza. "La pioniroj de la
Frateco"—D-ro Lindolpho Xavier.

Je la 19a horo okazis esperantista vespermanĝo ĉe restoracio
"A Vegetariana."

21a—Je la 9½a horo, laŭ iniciato de la katolikaj kongresanoj,
okazis, ĉe la preĝejo "Kruco de l' Militistoj" meso farita de l'
kanoniko Francisco Mac-Dowell, kiu, je la Evangelio, eldiris
bonegan paroladon kaj konsilis la fondon, en Rio de Janeiro, de
Esperantista Katolika Ligo. Oni kantis la preĝon "Saluton, Ma-
rio" kaj esperantistajn kantojn.

Je la 13a horo la kongresanoj efektivigis belegan promenadon al la supro de "Pao de Assucar," kie ili kantis, dancis kaj multe amuziĝis.

22a—Gi estis konsiderata "Esperanto Tago," en la programo de la Internacia Eksposicio. Ĉiuj kongresanoj povis eniri senpage. Oni disdonis multegon da esperantajoj. Vespere ĉirkaŭ 400 skoltoj de la Asocio de Brazilaj Katolikaj Skoltoj promenadis tra la Eksposicio kaj salutis la kongresanojn kiuj tiam kunvenis antaŭ la Palaco de l' Festoj. Ili kunportis ankaŭ la esperantistan standardon kaj ilia muzikistaro ludis la himnon "La Espero."

23a—Je la 20a horo kaj duono okazis ĉe Club Gymnastico Portuguez spektaklo kun prezentado de la komedioj "Amo per proverboj" kaj "Ne parolu al mi pri tio," tiu ĉi en portugala lingvo ludita de anoj de "Centro Germinal." Ankaŭ oni deklamis monologojn kaj poeziojn.

La tre konata karikaturisto D-ro Raul Pederneiras, prezidanto de la Brazila Gazetara Asocio, faris tre interesajn karikaturojn. La lasta estis bonega portreto de Zamenhof, sub kiu li skribis la vorton "Antaŭen!"

24a—Je la 20a, ĉe la belega salono de la Asocio de l' Komercoficistoj, okazis la solena ferma kunsido kun la ĉeesto de reprezentantoj de Ministroj, de 18 Ŝtatoj kaj de multaj asocioj.

Paroladis pri la "Vivo de Zamenhof" Dro. Venancio da Silva, vic-prezidanto de Brazila Ligo Esperantisto. Poste parolis la reprezentanto de Ŝtato Parahyba kaj rusa samideano.

D-ro Leonel Gonzaga, prezidanto de l' kongreso, faris malgrandan raporton per kiu li montris ke la Sepa superis la antaŭajn kaj kore dankis ĉiujn, kiuj per sia ĉeesto aŭ subteno briligis la kongreson.

D-ro Estacio Coimbra, vic-prezidanto de la Respubliko, telegrafis al la prezidanto de la Organiza Komitato, gratulante lin pro la grandega sukceso de l' Kongreso, kiun li ne povis partopreni pro foresto.

Poste okazis bonega koncerto, kiu finiĝis per la himno "La Espero" kantita de 25 fraŭlinoj.

Laŭ la diro de la tuta gazetaro, kiu detale priskribis pri ĉiuj okazintajoj, la kongreso tre favore impresis la publikon.

Estas inda je speciala referenco "Jornal do Commercio," la plej grava ĵurnalo en Brazilio, kiu dum sep tagoj dediĉis al la kongreso multajn kolonojn kaj publikigis ĉiujn paroladojn. Mi kredas ke neniam tiel okazis en iu ajn esperantista kongreso.

Estas ankaŭ notinda la fakto ke la ĉefaj komercaj asocioj aliĝis al la kongreso.

La Esperanta Movado
en
Norda Ameriko
E. A. N. A.

The great event of the year for North American Esperantists is the Annual Congress. At that gathering, once in every year, the scattered and diversified rays and waves of Esperanto energy are, as it were by a burning-glass, focussed into one point of white-hot enthusiasm.

There our officers of the past year give an account of their stewardship, and there our leaders plan our next campaign. To apply the words of Edmond Privat to our own congress, the 16th Congress should be "militkonsiliĝo por la triumfigo de Esperanto."

We gather from the program that the Congress will not waste time over peddling details of organization and routine, but give themselves to the consideration of the ways and means of a bold, concentrated and comprehensive forward movement.

The rank and file stand for Esperanto first, last and all the time. Along this straight line we are looking to our leaders to give us a real lead. We believe that they will do so and that all who attend the meetings will renew and enlarge their confidence in Esperanto, in their leaders and in themselves.

Therefore we say—Success to the 16th Annual Congress of the Esperanto Association of North America.

Let every Esperantist who can, go to Union Hill, N. J., July 11 to 14, and let those who cannot go support the Esperanto movement by their interest and their contributions. All applications for tickets and contributions should be sent to Dr. E. Kohl, Sec'y Esperanto Congress Committee, North Hudson, Box 32, Weehawken P. O., N. J. Editor.

USONO

The May "Open Road" publishes a fine and well illustrated article on Esperanto by Dr. D. O. S. Lowell. We understand this is being reprinted by the Central Office.

It would seem that Usono Esperantists are so busy packing their kits for the journey to the Congress at North Hudson that they have had no time to send us any news. We would suggest that Esperantists will find numerous opportunities for propaganda work during vacation and that a few members of a group meeting informally in the Park may do as much for Esperanto there, as in the more formal gatherings of the winter sessions.

KANADO

Victoria, B. C. We culled the following item of news from the British Esperantist for April and we append the note of the Editor of that Journal.

VICTORIA, B. C.

Resumé of our efforts in 1922.

We had forty-six meetings during the year. At eighteen meetings, only four were present; at ten, only five; at eight, only three; at five, only six; at two, seven attended; at one, eight were present; at two, only two came; and once, at least, I was alone.

I have tried to keep the movement before the public through the press. Thirteen times in the **Colonist** and nine times in **The Times** (both of Victoria), once in **The Globe** (of Toronto) and twice in the **World** (a Vancouver paper). Some of these were articles descriptive of the early history of Esperanto, others were letters and announcements. On January 19th the second anniversary of our first meeting, there did appear for the first time a letter in the **Colonist** on Esperanto from another pen—a member of our Group and my recruit for the U. E. A.

Then I have done my best in speaking; once at the "Men's Unemployed," once at Women's Meeting, once at the Annual Conference of the Local Women's Council; a few words at the Women's Educational Club, and I got up a Public Meeting at the City Hall, in the School Board Room, where Mr. H. H. Smith, Principal of the High School, was good enough to preside. Once, at a private house, before ten to twelve people I was unexpectedly asked to speak on Esperanto, and once at a Parent Teachers' Meeting. A certain amount of interest has certainly been awakened, but people seem so much more inclined to listen to what those people say of Esperanto who know nothing of the movement or the language, than to give credence to one who really is interested in it, that it makes very slow work. A. Wicks, Room 6, Brown Block, Broad Street, Victoria, B. C.

(We have printed the above in full because we think it sets a splendid example of faith and hope and patience in circumstances of exceeding difficulty. Our best wishes and heartiest sympathy go out to Miss Wicks.—Ed.)

Montreal. We have had cheering news and enquiries from our President, S-ro Bardorf, from time to time.

Toronto. The Society at their last meeting said good-bye to Miss Elliott who is about to move to New York. D-ro Allen has left on a visit to Europe. He is hoping to attend the International Esperanto Congress at Nurnberg.

The following article is from the Toronto Globe of May 30. It is reproduced here because it is an example of the practical value of Esperanto, in everyday life.

FLUENT ESPERANTIST SOON FINDS FRIENDS

Ignorant of English, Finlander Meets "Compatriot"
in Editor of "Amerika Esperantisto"

Popular Tongue at Home

While the brotherhood of man and an international language are yet part of the visionary future, now and then little incidents occur which bring them ever nearer. Such, at any rate, is the unique story of Pauli Torma.

Arriving in Canada a week ago, the first time that he had set foot outside his native Finland, Torma, lured by the tales of the prosperity of the new land which are whispered round the firesides in the long winter evenings, came directly to Toronto. A workman, possessed only of a perfunctory education, he was unable to speak a word of English, but, due perhaps to the care of the immigration officials, came safely to his destination.

New Language Common Bond

First of all, he presented himself at the residence of A. P. H. Rollason, 44½ Hayden Str. Admitted by a member of the family who was unable to understand definitely just what the visitor wanted, Torma, on meeting Mr. Rollason, burst into a torrent of language. No country in the world officially recognizes the tongue which Torma used, no histories trace its comparative philology, for it was Esperanto—often scorned as the tool of visionaries and lightly mocked as a hobby.

But Mr. Rollason is the Secretary of the Toronto Esperanto Society and Editor of Amerika Esperantisto, the official magazine of the Esperanto Association of North America, and soon Torma was pouring out his tale with all the delight of one who encounters a compatriot in an alien land. He spoke Esperanto fluently, and the conversation progressed as smoothly as that of two sons of the same motherland.

"How did you locate me?" asked Mr. Rollason.

"I was referred to you by Harry Perkins, who is listed in the International Esperantist as the Toronto delegate," replied Torma.

Popular Language in Finland

"But how does it happen that you speak Esperanto?" was the next question. "Oh, in Finland many people study it. I have passed all but my final examinations, and many of my fellow-workmen have progressed much further."

Torma said he had already secured work in Toronto and expects to add a third language to his linguistic attainments by an earnest study of Canadian speech. "Jobs are scarce in Finland", he said. "We heard that there was much work and money to be had in Canada, so I came."

Meksikurbo

La bonekonata Akademio de Lingvoj de nia samideano Profesoro P. S. Rodriguez, en Meksikurbo, donas senpagajn lekcionojn de Esperanto. Tiuj ĉi lekcionoj okazas ĉiujaude.

"El Hombre" (La Homo), semajna ilustrita gazeto eldonata en Meksikurbo, publikigas de tempo al tempo artikolojn pri la Esperanta movado.

La eldonanto de la tre leginda meksika gazeto, "Arguso," diras ke li multe necesas ĉefe ĉajn ŝlosilojn hispanlingvajn, kaj volas

ke tiuj kiuj povas vendi al li provizon da ĉi-tiuj libretoj skribu al li. Lia adreso estas:—Sro. U. C. Rodriguez, Apartado Postal 2482, Mexico, D. F.

Tampico

Nia fervora samideano, Sro. E. E. de Guerra, poštoficestro de Tampico, instruas nian lingvon al poštoficistoj dufoje po semajno. Li, kun lia edzino, kiu estas ankaŭ tre entuziasma kaj speranta Esperantistino, starigis la grupon "Anahuac," en Tampico. Kiam la grupo fondiĝis, en la monato de septembro 1922, ĝi havis 13 anojn. Gia nuntempa anaro estas 23. Bonege, Tampico!

Meksikaj samideanoj!

Ni volas memorigi al vi ke la "Amerika Esperantisto" estas via gazeto. Do, skribu ofte al ni pri la progreso de Esperanto en via urbo, kaj pri la agado de viaj grupoj.

Sinjoro Jose Augusto, Kongresano de Brazilio, prezentis proponon al la estraro ke oni starigu katedron oficialan de Esperanto en la Kolegio de Pedro II, kaj en ĉiuj la naciaj lernejoj en kiuj oni havas lingvajn ekzamenojn.

La propono estis sendata al la Komisio de Instruado, kiu unanime aprobis, kaj eldonis raporton favoran al Esperanto. Tiu ĉi raporto estis legata en la Ĉambro de Deputitoj de Sinjoro Tavares Cavalcanti, kaj dum la diskutado en la Ĉambro Sinjoro Augusto de Lima faris bonegan paroladon en favo de nia lingvo. Fine, la lego estis akceptata kaj sendata al la Senato.

La Ministro de Internaj kaj Fremdaj Aferoj akceptis la rolon de Honora Prezidanto de la sepa Kongreso Esperanta de Brazilio.

Traduko de hispanlingva artikolo en la Meksika Esperanta gazeto "Arguso." D. W. Jenkins.

NEKROLOGIO

CRESTON C. COIGNE

Bedaŭre ni havas por anonci la morton de nia Novjorka samideano, Creston C. Coigne, kiu tiel fervore laboris por la antaŭenigo de nia kara lingvo. Lia vigleco ja meritas la envion de la plejmulto el nia membraro kaj ni memoru lin kiel la verdan standulon kiu ĉiam emis al la disvastigado de Esperanto en ĉiun angulon de la mondo. Kompreneble ne multaj samideanoj konis lin intime, ĉar malofte li ĉeestis la kongresojn, kaj interparole li ne sin puĉis. Tamen, li malmis prese kaj letere, kaj multaj, kiuj korespondadis kun li, miris je la kurago kaj la fido kiujn senĉese li elmontris.

XV-a Universala Kongreso de Esperanto

en Nürnberg

4a Cirkulero

Aliĝoj. Aliĝis ĝis fino de februaro 2192 kongresanoj el 33 landoj. Ni petas, ke per tuja aliĝado oni helpu kaj plifaciligu la laboron de LKK.

Kongreskotizo. Pro generala malplivalorigo de la germana marko dum la pasinta kvaronjaro ni estas bedaŭre devigataj denove plialtigi la kongreskotizon por aŭstroj, germanoj, poloj, hungaroj kaj rusoj, fiksante ĝin je 3000 gmk. depost la 1-a de aprilo.

Por plifaciligi kaj malkarigi la aliĝadon de eksterlandanoj, ni rajtigas kaj petas la Naciajn Asociojn kolekti la aliĝojn kaj kotizojn de siaj anoj kaj transsendi ilin kune je fino de ĉiu monato al LKK.

Restadpermeso. Laŭ dekreto de Distrikta Polico, la kongresa karto havigas la permeson restadi tri semajnojn en tutu Bavarujo. La eksterlandanoj ricevas rabaton de proksimume tri kvaronoj de la oficiala takso. Pri pasporto kaj vizo ni informos pli poste.

Loĝigo. Multaj samideanoj petis pri perado de malkaraj loĝegoj. Volonte ni atentos pri tio kaj aranĝos ankaŭ komunajn dumnoktejojn.

Apudaj kongresoj. Rekte antaŭ la Universala Kongreso okazos en Nürnberg apartaj kongresoj de Germana Esperanto Asocio, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj Tutmonda Polica Ligo.

Blinduloj. Dum la XV-a okazos ankaŭ la 3-a internacia blindula kongreso. Aliĝis ĝis nun 45 blinduloj el 7 landoj. Ili havos senkostajn kongresan karton kaj loĝejon ĉu en la Blindula Instituto ĉu en najbara lernejo. La elspezoj por la manĝoj, kiujn disponigas la Instituto je memkostoj, estas pagotaj per la donacoj al la blindula kaso. Eventualaj kondukantoj de la blinduloj ricevos la samajn favoraĵojn, sed pagos la kongreskotizon. Aranĝo de koncerto estas projektata.

Fakkunsidoj. Estas plue anoncita la jenaj fakkunsidoj:

- a) Internacia Esp. Ligo de Liberpensuloj kaj Monistoj; Adr. Kurt Hubricht, Leipzig-Neustadt, Mariannenstr. 30-III.
- b) Teozofia Esp. Ligo; Adr.: F-ino Maria van Rees, ĉefsekretariino, Wilderswill, Chatet Bertha, Svislando.
- c) Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj; Adr.: Erich Habellok, Breslau, Schleiermacherstr. 19.
- d) Kristana Esperantista Ligo; Adr.: Paul Hübner, Quedlinburg, Bergstrasse 1a.
- e) "Konkordo" Adr.: Edvardo Wiesenfeld, Warszawa, Biala 3.
- f) Aŭstrua Esp. Delegitaro; Adr.: Centra Oficejo, Wien, Mollardgasse 55.
- g) por psikistoj; Adr.: Direktoro L. Gube Berlin-Friedenau, Fregestrasse 26.
- h) por studado de naciaj lingvoj; Adr.: Johann Jungfer, Lübben N.-L., Lindenstrasse 10.

Por certigi fruktodonan daŭriĝon, ni petas, la interesulojn, jam nun interkorespondadi pri la preparoj, starigo de programo, elekti de referentoj ktp., turnante sin al la nomitaj adresoj.

Ciu fako aŭ nacia societo, kiu intencas aranĝi apartan kunsidon, estas petata, komuniki ĝin ĝis la 1-a de majo al LKK.

Festaranĝoj. Krom aliaj festaranĝoj ni reprezentigas la faman dramon "Natan la saĝulo" de E. Lessing, Esperantigita de Karl Minor kaj eldonata ĉe Ellersiek & Borel, Berlin. La teatraĵo estos ludata de eminentaj geaktoroj de la Urba Teatro, kiuj jam nun fervore studas Esperanton en speciala kurso.

Por la projektata Internacia Dancrevuo, kiu estas certe atrakcio en la kongreso, ni petas la Naciajn Asociojn kaj Societojn, konigi jam nun

proponojn kaj deziresprimojn. Estus bone, se ĉiu nacio estus reprezentata de almenaŭ 4 paroj, kiuj dancas en naciaj kostumoj kaj laŭ originaia muziko de sia lando. Premioj estas disdonotaj.

Poštosticejo. En la kongresa kunvenejo troviĝos aparta poštosticejo kun Esp. oficistoj. La leteroj kaj poštakartoj estos stampataj per oficiala stampilo. Jam nun elirantaj poštajo surhavas reklamstampon kun la teksto: Vizitu la XV-an Universalan Kongreson de Esperanto en Nürnberg, 2.—8. aŭgusto 23.

Kongressigno. Bela arta signo arĝentita, surhavanta verdan stelon kaj vidajon de la Nürnbergga Kastelo, estas preta. Gi estos disdonata al la kongresanoj en la Akceptejo.

Propagando. Glumarkoj — pro malaktualeco — kaj kongresafiŝoj — pro multekosteco — ne estas eldonataj, tiom malpli, ĉar la propaganda valoro laŭsperte ne estas konsiderinda. Serio da belaj ilustr. poštakartoj kaj aliaj memorajoj pri la kongresurbo estas en preparo.

Komercista propagando... Diversaj gravaj komercistaj firmoj disdonigas Esperantlingvajn prospektojn kaj reklamilojn. La Leipziga Foiro montrigas specialan filmon pri la industrio de Germanujo. Similaj aranĝoj estas projektataj.

Korespondado. Pro la grava plialtigo de la pošttarifo ni petas denove aldonon de respondkuponoj, kiam oni petas informojn.

5-a Cirkulero

1. Protektoreco. Lia Mosto, prezidanto de la Germana Respubliko, Friedr. Ebert, bonvolis akcepti la honoran protektorecon por la XV-a.

2. Aliĝoj... Aliĝis ĝis fino de aprilo 2910 kongresanoj el 36 landoj. Bedaŭre ni devis sciigi, ke diversaj eksterlandaj samideanoj hezitas la aliĝadon, timante personajn malfacilajojn dum vojaĝo kaj restado. Konsternite pri tio, ni rapidas konstati, ke ne estas kaŭzo por tiaj timoj.

3. Kongreskotizo. Pro neantaŭvidita evolucio de valutaj cirkonstantoj la projektita plialtigo de la kotizo depost 1. junio ne okazos, escepte por aŭstroj, germanoj, hungaroj, poloj kaj rusoj. Por la lastenomitaj landanoj, pro certigo de la budĝeto, plialtigos la kotizo depost 1. junio al 10,000 gmk.

4. Kongresbanko. La kongresbanko estas la firmo Walk & Grün, Nürnberg. Gi starigos de 2.—8. aŭgusto apartan kontoron en la kongresejo.

5. Financoj. Ni preferas ricevi la kotizojn el eksterlando per monbiletoj. Tiuj kongresanoj, kiuj tamen ŝatas pagi per bankĉekoj aŭ transpagiloj, bonvolu uzi, por spari al si kaj al ni spezojn, la jenajn bankojn kunigitajn kun la kongresbanko: Allgemeiner Böhmischer Bank-Verein Prag; Kroatische Filiale des Wiener Bankverein, Zagreb; Britisch-Ungarische Bank, Budapest; Österreich. Creditanstalt für Handel u. Gewerbe, Wien; Credito Italiano, Mailand; Schweizerische Bankgesellschaft, Zürich; Rotterdamsche Bankvereeniging, Rotterdam; Kleinwort Sons & Co., London E. C. 3., 20 Fenchurch Street.

5. Fakkunsidoj. Estas plue anoncitatj la jenaj fakkunsidoj:

- a) Univ. Esp. Asocio Junulara: adr. Aleks. Hirsemann, Breslau, Herzogstr. 36;
- b) Vegetara Ligo Esperantista: adr. Oskar Bünemann, Hamburg-Fuhlsbüttel, Alsterkrugchaussee 586.
- c) Katolikoj: adr. J. Stahl, Nürnberg, Jakobsplatz 17-II.
- d) Int. Ligo de Esp. Poštsticistoj (Ilepo): adr. sup. registara konsilisto Otto Reber, Bamberg, Kapuzinerstr.
- e) Franka Esp. Ligo: adr. la sama.
- f) Framasonoj: adr. C. Barthel, Frankfurt a M., Wöhlerstr. 14.
- g) Instruistoj: adr. Hans Kaupper, Nürnberg, Parkstr. 13-II.
- h) Kursgvidantoj: adr. Emil Kreibich, Kladno (Bohemio), Železárny.

i) Eksmilitintoj kaj militviktimoj: Karl Dörfler, Mühlendorf a. I., Bavarjo, Siedlungswerk.
 k) Interfoira Komisiono: adr. Prof. D-ro Dietterle, Leipzig-Schl., Seumestr. 10.

7. **Kongreslibro.** La presado de la kongreslibro komenciĝis. Krom la oficiala parto ĝi enhavas ankaŭ reklamojn, kiuj peras unikan okazon por internacia negoca propagando. Ni petas ĉiujn samideanojn interesigi gravajn firmojn kaj societojn de ilia urbo, por ke ili rekte interrilatu kun LKK. Unu paĝo kostas 120,000, duona paĝo 65,000, kvarona paĝo 33,000 gmk.

8. **Poštarkoj.** Belaj ilustr. poštarkoj pri Nürnbergaj vidindajoj kun Esp. teksto jam nun estas liverebraj kontraŭ antaŭpago. La prezoj (inkluzive sendkostoj) estas por 30 diversaj kartoj 4,000, por 15 kartoj 2,500 gmk.

9. **Kongresaranĝoj.** En la kadro de la oficiala programo okazos: teatraj prezentoj de "Natan la Sagulo" de Lessing kaj de le Mozarta opereto "Bartien kaj Bartienne," instrument- kaj kant-koncertoj, diservoj en katolika, protestanta kaj hebrea ĉefpreĝejoj, internacia recitadmatineo, kabareda vespero, internacia kostumbalo kun enmetitaj popoldancoj, komuna tuttaga ekskurso al Rothenburg (mondkonata mezepoka juvelujo). Laŭ deziro ni aranĝos postkongresajn ekskursojn al München (Alpoj) kaj Leipzig.

10. **Vivkostoj.** Ni ricevas ĉiutage demandojn pri la lokaj prezoj por loĝado kaj manĝado. Pro la malstabileco de la cirkonstancoj estas neble starigi jam hodiaŭ definitivan dumkongresan prezaron. La nuntempaj tagkostoj estas (sen trinkajoj): unuaranga hotelo 50,000, duaranga hotelo aŭ komforta privatloĝejo 25,000, bona privatloĝejo kaj manĝado en restoracio 12,000, komuna manĝado kaj dumnoktado 5,000 gmk.

11. **Vojagkostoj.** Ĉar la somera horaro aperos en la venontaj semajnoj, ni povas publikigi ĉiujn rilatajn detalojn nur en nia junia cirkulero.

12. **Blinduloj.** Aliĝis por la III-a ĝis nun 88 partoprenontoj el 12 landoj. La kongresejo estos la Blindula Instituto. Gi faros la eblon por plej malkara gastigado; la senkosta restado dependos de la enirontaj donacoj, sed ne povas esti garantiata jam nun.

13. **Policanoj.** Laŭ interkonsento kun la prov. direktoro de Tutmonda Polica Ligo, la LKK prenis sur sin ankaŭ la lokajn preparojn por tiu ĉi fakkongreso, kies kunvenoj okazos en la historia ejo de la "majstrokanistroj" (Katarina preĝejo). La aliĝaj kondiĉoj estas la samaj kiel ĉe la Un. Kongreso. Urba polica patronaro estas starigita, senkostaj kušejoj disponigitaj. Pluaj detaloj en "Policisto."

Represo petata.

Loka Kongresa Komitato.

Recenzoj

ELEKTITAJ HUMORAJ RAKONTOJ: represitaj el The British Esperantist kaj The Esperanto Monthly. Eldonejo: Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Street, W. C. 1, Londono. 24 pp. 12-mo. Prezo mankas, eble du respondkuponoj. A very interesting group of short stories, etc., and a few rhymes. One original writing, "Savita per Esperanto," by John Merchant and the rest are translations, notably "Pirotekniko" by Artemus Ward, translated by Wm. Page. Other selections are from the Polish, Belgian, and so on, all in excellent Esperanto.

La Verda Folio

Alegorio por Komencantoj
J. H. Fazel

Mi tenas en mia mano vivantan folion. Vidu ĝin. Ĝi nun estas tute verda, same kiel nia Esperanta stelo; sed baldaŭe ĝi fariĝos flava, seka, malviva. KIAL? Ĉar ĝi disigis sin de la arba branĉo.

Ĝi ne plu svingas en la pura aero alte supre la tero, kie ĝi povis vidi la mondon, kaj kanti kun la birdoj, kaj kunfrapi la manojn kune kun ĝiaj kunuloj. KIAL? Nur ĉar ĝi malsage ne plu tenas firme al sia amanta patro, la Arbo.

Nun ĝi rampas en la pulvo, anstataŭ murmurante inter ĝiaj feliĉaj amikoj en la dolĉaj ventetoj de la mateno. KIAL? Ĝi simple delasis sian tenadon sur la forta, subtenanta Arbo.

Nun la kompatinda folio devos kuŝi surtere por esti pied-premota en la koto; ĉar ĝi permesis al si esti malkuraĝigita; esti disigita de ĝia natura hejmo; depelita de la Arbo per la vento; depremita de la pluovo, enuigita pro la brilanta suno, aŭ dormanta kun la roseroj en la nokto.

Ne estu vi kiel la malsage, perdita folio! Sed vi faru kiel diras la sankta skribajo, "Tenadu, kion vi havas, por ke neniu arogu al si vian kronon."

La somero ankoraŭ estas junia, verda, kaj longe daŭros. La folio (Vidu ĝin!) ne estas ankoraŭ matura. Ĝi jam ne bezonis ekfali. Ĝi ne bezonis morti. Ĝi devus ankoraŭ funkcii, kreski, kanti sur la Arbo.

Jen estas branĉo plena de vivantaj folioj kiun mi derompis de la sama Arbo. Miliono da aliaj folioj ankoraŭ vivas, kreskas, kaj amikeme kunfrapas unu kun aliaj la manojn en vivaj eks-tazoj. Aliaj folioj sennombraj ne ellasis la Arbojn.

Same kiel ĉi tiu branĉo plena da verdaj folioj, miloj da homoj ellernis Esperanton; simple ĉar ili konservadis iliajn kuraĝojn, agigis iliajn energiojn, kaj persistadis surtenante al Esperanto.

Tiel vi faru, miaj karaj gekomencantoj, TENADU!

"Konservu la modelon de sanaj vortoj, kiujn vi aŭdis de mi, en fido kaj amo."

Topeka, Kansas.

Oktobro 10, 1922

La Legendo pri la Postlasajo de la Maŭro

Rakonto de Washington Irving (daŭrigo)

Tradukita de D-ro Louis Allen, University of Toronto

Kiam la skatoleto frapis la plankon, ĝia kovrilo malfermiĝis kaj la pergamena ruleto elfalis. Peregil sidis kelkan tempon en melankolia silento kaj rigardis la ruleton. Fine, reprenante siajn ideojn, li ekpensis: "Kiu scias, ĉu tiu ĉi skribajo ne estas io grava? La Maŭro ja ŝajnis gardi ĝin kun granda zorgo." Tiam, relevinte ĝin, li ĝin kaſis sur sia brusto, kaj la sekvantan matenon, dum li iradis kriegante sian akvon tra la stratoj, li haltis je la butiko de Maŭro, veninta la Tanĝero, kiu vendadis juveletojn kaj parfumajojn en la Zakatino, kaj petis lin klarigi ĝian enhavon.

La Maŭro atente tralegis la skribajon, tiam li glatigis sian barbon kaj ridetis. "Tiu ĉi manuskripto," li diris, "estas magia formulo por la malkovro de kaſitaj trezoroj, kiuj estas tenantaj sub la potenco de sorĉado. Oni diras, ke ĝi posedas tian forton, ke la plej solidaj seruoj kaj rigliloj, eĉ la monto granita mem, cedas al ĝia potenco."



Hudson County Esperanto Society. J. J. Sussumth, Pres., in centre.

“Ba” ekkriis la Galicianeto, “kion tio faras al mi? Mi ne estas sorĉisto, kaj mi nenion scias pri kaŝitaj trezoroj.” Tiel dirinte, li reprenis sian akvovazon, kaj lasinte la manuskripton en la manoj de la Maŭro, li daŭrigis sian ĉiutagan rondiradon.

Tiun vesperon, tamen, dum li ripozis en la duonlumo apud la puto de la Alhambro, li aŭdis tie grupon da babilemaj personoj, kies interparolado—kiel tio ofte okazas en tiu krepuska horo—havis kiel temon malnovajn historiojn kaj tradiciajn rakontojn pri supernaturaj okazintajoj. Ĉar ili estis ĉiuj tiel malriĉaj kiel la ratoj, ili rakontadis kun speciala plezuro pri la ensorĉaĵoj lasitaj de la Maŭroj en diversaj partoj de la Alhambro. Ĉiuj konsentis, ke ekzistas grandegaj trezoroj, kiuj estas enterigitaj en profundaj kašejoj sub la turo kun la sep subteraj etaĝoj.

Ci tiuj rakontoj, faris eksterordinaran impreson sur la imago de la bona Peregil, kaj ili penetris ĉiam pli profunde en lian cerbon dum li reiradis hejmen tra la mallumiĝantaj stratoj. “Se, malgraŭ ĉio, efektive ekzistus trezoroj, kaŝitaj sub tiu turo—kaj se la manuskripto, kiun mi lasis ĉe la Maŭro, donus al mi la eblon malkovri ilin!” La penso tiele ravis lin, ke li preskaŭ lasis fali sian akvovazon.

Dum la tuta nokto li turniĝadis en sia lito kaj apenaŭ fermis okulon, tiel ekscitita li estis. La sekvantan matenon, tre frue, li iris al la butiko de la Maŭro, kaj rakontis al li pri la ideo, kiu venis al li en la kapon. “Vi scias legi araban lingvon,” “ni iru kune al la turo por provi la potencon de la sorĉo; se ni nenion atingos, almenaŭ ni nenion perdos, sed se la sorĉo sukcesos, ni faros justan dividon de tio, kion ni trovos.”

“Atendu,” respondis la muslimano; “ci tiu skribajo per si ne suficias. Oni devas ĝin legi je la noktomezo ĉe la lumo de kandelo kurioze ellaborita kaj preparita, kaj kies ingrediencojn mi ne havas la eblon ricevi.”

(Daŭrigota)

THE
“EDINBURGH”
Esperanto Pocket Dictionary

Esp.-Eng. & Eng.-Esp.

Cloth Binding \$0.75 Leather \$1.75

On sale at Esperanto Office or at leading Booksellers.

T. Nelson & Sons, Ltd., Toronto

"Lord, kick us out softly"

This is what native Christians on the Congo have been singing for their closing hymn on Sunday evenings.

But they did not sing with that enthusiasm which generally accompanies the last hymn.

At length the missionary found out why. These words were intended to be a translation of "Lord dismiss us with thy blessing."

Now with Esperanto such a mistake could not have happened. Our magazine "Amerika Esperantisto" goes to every civilized country in the world, and to Esperantists everywhere the meaning of the Esperanto in it is as clear as daylight.

There is much satisfaction in the feeling that when you get your copy of "Amerika Esperantisto" you have in your hand something which is really binding the peoples of the world together.

"Amerika Esperantisto" is actually establishing and cementing a bond of sympathy between you and people of other races and tongues. It is making you and them citizens of the world.

This is a wonderful movement, this movement toward greater human co-operation. It deserves the help of all right-thinking and forward-looking men and women.

Now while you have it in mind, will you be so good as to pick up your pen and write down the name and address of a friend. Pin a dollar bill to the letter—a year's subscription to "Amerika Esperantisto"—then send it to

The Secretary, Esperanto Association
of North America, 507 Pierce Bldg.,
Copley Square, Boston 17, Mass., U.
S. A.

This is not a great thing to ask. It will please your friend. It will encourage us. Above all it will help on Esperanto.

STRIKE WHILE THE IRON IS HOT—A CLASS THEN AND THERE
BOOKS and PROPAGANDA Material of all kinds are on sale at The ESPERANTO OFFICE
Drop us a postcard asking for a catalog
THE ESPERANTO OFFICE, 507 Pierce Building, Copley Square, Boston 17, Mass., Usono

MISERERE (Wagnalls) kaj THAIS (France) Po \$.50.

La ROZUJO ĈIUMILJARA (Wagnalls)
La AKROBATO de Nia Sinjorino
BLANCHE, la Virgulino de Lille (Schubin)
MIMI, Rakonto pri la Latina Kvartalo
dum la Milito (Giesy) Po \$.35.

La unuaj eldonajoj tradukitaj de
S-RO EDWARD S. PAYSON

Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko
Aĉeteblaj ĉe la Esperanto Office,

Po \$0.35

Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass.

DEZIRAS KORESPONDI

Four insertions: 25 cents. Announcement
consists only of name and full address. Additional
matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poštaj respond-kuponoj.
Anonco konsistas nur el nomo kaj plena
adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k.

S-ro V. A. Platnikov, Rusujo, Moskvo, Or-
dinskij Tupik d. 6, Rv. 19, sendas salutojn
al siaj malnovaj korespondantoj kaj deziras
renovigi korespondadon kun ili. Ankaŭ de-
ziras korespondadi kun Esperantistoj de
ĉiuj landoj. Promesas respondi. Li povas
interŝangi librojn, gazetojn, ĵurnalojn, p.k.
aŭ leterojn, k.t.p.

Mrs. Derry, 156 Douglas Rd., Acocks Green,
Birmingham, England, d. k. kun Boston aŭ
Usono.

S-ro Jan Merta, Forberk 5, Wamberk, Čeko-
slovakia.

Oklahoma City, Okla. (Usono) Grupo. I.P.K.,
L. Sin turnu al R. E. Dooley, 527 North
Durland.

THE WRITER'S MONTHLY

Edited by J. Berg Esenwein

A magazine of real help for those who write.
Carolyn Wells says:

"The best magazine of its kind because it
is practical."

Single copies 25 cents \$3.00 a year

THE WRITER'S MONTHLY, Dept. A
Springfield, Mass., U. S. A.

ATTENTION! ESPERANTISTS!

The LLANO PUBLICATIONS

record the doings of the Llano Co-operative
Colony in Louisiana. This group of co-oper-
ators are using Esperanto largely and aim
to use it in their every day work. It is
probably the only community of its kind.
Children are taught Esperanto in the High
school course. They are also co-operating in
the production and distribution of the neces-
sities of life. They have a beautiful social life
in a healthy happy community. Write for
literature and ask for a sample copy free.

LLANO CO-OPERATIVE COLONY

Leesville, Louisiana.

SKANDINAVA ESPERANTISTO

Monata internacia gazeto, ĉefe en
Esperanto, parte en sveda lingvo.
Enhavas artikolojn pri lingvoj,
scienco, propagando esperanta,
informojn ĉiuspecajn, k. a.

Jarabono: duondolaro

Adm: Skandinava Esperanto-Instituto,
419 Seventh St., Rockford, Illinois,

USONO

ADVERTISE IN ENGLISH — AND IN ESPERANTO

Reklamoj \$20. po pago— $\frac{1}{4}$ paĝaj aŭ pli—10 numeroj sen ŝango \$150. Perantoj skribu, pri rabato.

THE PERSON WHO NEGLECTS TO

STUDY ESPERANTO

IS BLIND, DEAF, AND DUMB TO THE
WORLD HE NOW LIVES IN

ESPERANTO HAS THE ENDORSEMENT OF EVERY
REASONABLE INVESTIGATOR

as the one PRACTICAL auxiliary language
Recognized and in use as such since the World War by:

The International Red Cross
The World Union of International Associations
The French and Italian Associations for the Advancement of Science
The French Academy of Sciences
The International Women's Suffrage Alliance
The International Peace Bureau
The International Labor Office
The World Union of Women
The Catholic International League of Youth
The Young Men's Christian Association
The International Bureau of Freemasons
The International Fairs of Leipzig, Frankfort, Lyons, Paris, Basle,
Padua, Lisbon, Barcelona, Bratislau, Bordeaux, Vienna, Reichenburg,
Malmoe, and Helsingfors
The Centennial Exposition of Brazil
The Paris Chamber of Commerce
and dozens of other organizations

UNANIMOUSLY ENDORSED BY LEAGUE OF NATIONS ASSEMBLY
By vote of September 21, 1922

HESITATE NO LONGER

ELEMENTARY and ADVANCED
CLASSES FOR STUDY OF THE LANGUAGE

are now just forming in all the principal cities of
NORTH AMERICA
and courses by correspondence may be arranged for anywhere

(If you lack details as to local courses write today to)
The Central Office of the Esperanto Association of North America
507 Pierce Bldg., Copley Sq., Boston 17, Mass., Hdqrs. for information & supplies